

SCIENCA REVUO de
Internacia Scienca
Asocio Esperantista
BEOGRAD (Jugoslavio)

El Vol. 25
n-ro 2/3 (106/7)
20.5.1974.

PROPRAJ NOMOJ

EN ESPERANTO

SEPIK

TALLINN

SOVETIO

Lastatempe altrudas sin inter la esperantistoj tendencoj, kiuj endanĝerigas la tutan ideon de internacia lingvo. Oni forgesas aŭ ne volas kompreni, ke Esperanto ne estas la sola lingvo en la mondo kaj eĉ ne celas fariĝi tio (jam de la komenco ĝi estas pensita kiel internacia helplingvo, interkomprenilo inter la popoloj), kaj kelkfoje kondukas tiel, kvazaŭ ni volus pligrandigi la lingvan babelon per plia en si fermita lingvo.

Niajn ĝisnunajn sukcesojn ni ŝuldas ĉefe al tio, ke male al Volapük Esperanto estas internacia ne nur laŭ nomo, sed ankaŭ en sia strukturo, ke dank' al la simpla kaj logika gramatiko kaj grandparte absolute internacia radikaro (elektro, aeroplano, aŭtomobilo, kulturo, teatro, literaturo, gramatiko, kosmo, universala, radio, sporto, papero, kafo ktp., kiuj devus esti konataj kaj kompreneblaj al ĉiuj homoj en la tuta mondo, egale kio estas ilia gepatra lingvo), ĝi estas facile lernebla kaj uzebla. En Esperanto oni povas konstrui frazojn kaj tutajn tekstojn, kiuj estas senpere pli-malpli kompreneblaj al italoj kaj hispanoj, angloj kaj francoj, rusoj, poloj kaj ĉeĥoj, germanoj, danoj, svedoj kaj norvegoj, finnoj kaj estonoj, kiuj neniam ĝin lernis.

Sur tio estis grandparte bazita la sukceso de la popularaj Cseh-kursoj. En tiu rilato Esperanto multe superas ekz. la anglan lingvon, en kies prononco eĉ tute internaciaj vortoj, inkluzive ĉiuj propraj nomoj, deformiĝas ĝis plena nerekon-ebleco: culture fariĝas "kalĉe", literature "litriĉe", theater "thieté", tiger "tajgé", pilot "pajlet", Asia "ejŝe".

Volapük malsukcesis pro tio, ke ĝia vortaro, kvankam principe ĉerpita el la angla, latina, germana kaj franca lingvoj, estas tiom kripligita, ke ĝi konsistas el veraj rebusoj: plim komplimento, dol doloro, lol rozo, fablud fabriko, dūnal ministro, Yulop Eŭropo, Silop Azio, Fikop Afriko, Melop Ameriko, Talop Aŭstralio.

Vole-nevole oni ekpensas pri Volapük, kiam en Esperantaj tekstoj oni trovas tiajn enigmajn vortojn kiel Aŭvernio, Belvezo, Bordoza, Gulielmo, Holstinio, Jiveskilo, Ĵakvo, Ĵakvino, Kalezo, Kanno, Kuk-Insularo, Laŭzano, Lineo, Maniko, Messo, Neŭtono, Pado, Pajno, Palasa, Pozidono, Psika, Remso, Rodano, Sansimono, Tuluzo, Ŭejhajŭejo, Vajldo, Zuriko-Curiĥo ktp. Tiaj kriptogramaj fuŝformoj ekzistas en neniu alia lingvo kaj estas apenaŭ kompreneblaj eĉ al esperantistoj, inkluzive la rusaj, kiuj ne havas ilin en sia vortaro. Ne estas facile diveni, ke Aŭvernio nomiĝas en Esperanto la franca landparto Auvergne, ke Ĵakvo kaj Ĵakvino estas la francaj baptonomoj Jacques (Jakobo) kaj Jacqueline, ke Belvezo, Bordoza, Kalezo, Kanno, Messo kaj Remso estas la francaj urboj Beauvais, Bordeaux, Calais, Cannes, Metz kaj Reims, ke Pado signas la italan riveron Po, Rodano la francan Rhône, ke Holstinio estas en Esperanto la germana landparto Holstein, Neŭtono la angla fizikisto Newton, Lineo la mondfama sveda naturscienculo Linné, Vajldo la angla verkisto Wilde, Sansimono la franca filozofo Saint-Simon, Palasa la greka diino Pallas Atena, Pajno la greka mitologia Pan, Jiveskilo la finna urbo Jyväskylä, Zuriko-Curiĥo la svisa urbo Zürich, Ŭejhajŭejo ĉina nomo Wei-hai-wei ktp. La kvazaŭfabela Kuk-Insularo havas tamen nenion komunan kun bongustaj kukoj, sed portas la nomon de la angla maroficiro kaj iama mondvojaĝanto Cook (sekve temas pri Cook-Insularo), kaj ke la mistera Maniko estas la internacie konata La Manche (itale la Manica), tion povas kompreni nur la italoj kaj eble ankaŭ francoj; kiuj donis al tiu kanalo la nomon pro ĝia simileco al maniko (france manche, itale manica).

Ne pli bonaj, pli allogaj, pli kompreneblaj kaj pli internaciaj estas nomoj ne plene asimilitaj, sed transskribitaj en Esperanto laŭ proksimuma elparolo:

Shiller (Baudelaire), Gete (Goethe), Russo (Rousseau), Varengjen (Waringhiana), Njuton (Newton), Ajnŝtajn (Einstein), Frojd (Freud), Ĝejn (angla antaŭnomo Jane), Ŝarlrua (Charleroi), Ŝo (Shaw), Mom (angla verkisto Maugham), Gec (germana antaŭnomo Götz) ktp.

Mi prezentis ĉi-supre nur kelkajn ekzemplojn. Fakte ilia nombro estas pli granda. Nia ŝatata poeto William Auld konstatas ("Scienca Revuo" n-ro 4/5, 1970), ke jam grandega nombro da nomoj estas asimilita, kaj demandas, kial Esperanto ne asimilu ĉiujn? Dio gardu! Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj prezentas en "Mondmapo" la unuajn fruktojn de sia okjara laboro: la unuajn 850 nomojn el fizika kaj politika geografio, inter ili tiaj "perloj" kiel Bonaero (Buenos Aires), Kito (Quito), Riodeĵaneiro (Rio de Janeiro), Milvoko (Milwaukee), Novazemljo (Novaja Zemlja), Kebeko (Quebec), Lapazo (La Paz), Janmajeno (Jan Mayen) ktp. Tio signifas, ke nia lingvo pliriĉiĝis kaj niaj vortaroj plidikiĝis je 850 novaj vortoj, neologismoj, kiujn bezonas lerni kaj memori ne nur komencantoj, sed eĉ la plej perfektaj esperantistoj, egale al kiu scias ili apartenas kaj kiu estas ilia gepatra lingvo, ja, eĉ poliglotoj, kiuj scias multajn lingvojn! Ni kompreneble dankas la Komisionon pro la granda sinjora laboro, sed samtempe elkore petas: ho, ĉesu, karaj s-anoj, la nepoj vin benos! Ĉar se vi daŭrigos, post pliaj ok jaroj aldoniĝos ankoraŭ 850 "esperantigitaj" geografiaj nomoj, kaj malgraŭ tio restos ankoraŭ miloj kaj milionoj, kro- ne miriado da personaj nomoj. Niaj vortaroj fariĝos finfine dikegaj multvolumaj enciklopedioj!

La esperantigadon de propraj nomoj oni motivas per tio, ke ne ĉiuj esperantistoj povas prononci la diverslingvajn nomojn, kiujn ili trovas en Esperantaj tekstoj, ke en la rusa lingvo oni transliterigas ĉiujn nomojn de la latinalfabetaj lingvoj, ke Zamenhof skribis sian germandevenan nomon (Samenhof) ne laŭ germana maniero, sed laŭprononce, kaj por Shakespeare uzis la formon Ŝekspir.

Nu, la aŭtoro de Esperanto skribis sian nomon tiel plej verŝajne simple pro tio, ke tia estis laŭ la dokumentoj lia oficiala nomo - li estis ja ruslandano kaj tiutempe ĉiuj dokumentoj de la ruslandanoj estis ekskluzive ruslingvaj. Kaj la formon Ŝekspir li uzis, kiel ni scias, nur en la unua eldono de "Hamlet", poste ni trovas ĉe li konsekvence la senŝanĝajn Shakespeare, Goethe, Schiller, Orzeszko.

En la naciaj lingvoj ekzistas multe da fonemoj kaj nuancoj, kiuj per la ordinara alfabeto de kiu ajn lingvo (inkluzive la Esperanta) ne estas eĉ proksimume transdoneblaj kaj por alilingvanoj ankaŭ prononceblaj. Kiel transskribi ekz. la anglajn nomojn Galsworthy, Murphy kaj Wotherington, la francan Julien, hispanan La Paz, svedan Växjö, norvegan Bygdøy, finnan Jyväskylä? Por tio estas kreita speciala internacia fonetika sistemo, kiun oni uzas en lingvoscienco, sed por la praktika lingvouzo ĝi estas tro komplika. Ankaŭ en multaj ceteraj kazoj la transskribitaj nomformoj respegulas la prononcadon nur tre proksimume kaj sonas en la buŝo de alinaciano strange, tordite, malfacile kompreneble. Sekve ni povas nur bedaŭri, kiam rusa s-ano plendas, ke la 52 jaroj, dum kiuj li uzis Esperanton, ne sufiĉis por tiom ellerni la Esperantan alfabeton, ke li povu prononci multegajn proprajn nomojn, kiujn li trovadas en diversaj gazetoj, nomataj Esperantaj (G. Tupicin en "Nuntempa Bulgario" 1959, n-ro 4, p.43). Kara s-ano, vi forgesas, ke tiuj nomoj ne estas Esperantaj kaj ke la tasko de Esperantaj gazetoj ne estas instrui la prononcadon de ĉiuj lingvoj de la mondo. Cetero, 52 jaroj devus al lernemulo tamen sufiĉi, precipe al esperantisto, por pli-malpli konatiĝi kun la prononcado de nomoj almenaŭ en la ĉefaj lingvoj. Sed kiam la s-ano aldonas, ke li ne scias, kiel prononci la nomojn Jerzy Lec, Jarosinka Malek kaj Grzedzielski, kaj japana studento asertas, ke li ne povas prononci la anglan Glasgow, oni devas nur miri. Ĉu vere la finaĵo -o /Jerzio Leco, Jarosinko Maleko, Grzedzielsko, Glasgovo/ farus ilin pli prononceblaj? Apenaŭ.

La rusa lingvo ne povas ĉi-rilate servi al ni kiel ekzemplo, ĉar pro la ne-latina alfabeto en ĝi la transliterigado estas simple neevitebla. Cetero, ofte tio kaŭzas al la ruslingvanoj neagrablajn kaj ĝenajn maloportunaĵojn. Ekz. legante rusajn tekstojn kaj tradukante el la rusa lingvo oni multfoje ne scias, kiel retransliterigi nekonatajn nomojn, kiuj ne troviĝas en rusa enciklopedio, jam sole tial, ke pro manko de ekz. ä, ö, ü ne estas eble per la rusa alfabeto eĉ proksimume transdoni la prononcon de multaj germanaj, danaj, islandaj, norvegaj, svedaj, hungaraj, finnaj, estonaj, turkaj eĉ anglaj kaj francaj vortoj. Precipe dolore spertas tion ĵurnalistoj kaj scienculoj. Kaj ne malpli la rusaj esperantistoj, ĉar en pluraj okazoj ili devas scii kaj memori tri kaj eĉ kvar diversajn formojn, ekz. la rusajn Bordo, Kale, Cjuriĥ, Mjunĥen kaj Lejpcig, la aŭtentikajn Bordeaux, Calais, Zürich, München kaj Leipzig (almenaŭ en adre-

voj), la Esperantajn Bordojo, Kalezo, Zuriko kaj Curiĥo, Munkeno kaj Munĥeno, Lajpcigo kaj Lipsiko.

Samspecaj malfacilaĵoj prezentigas, kiam oni el Esperanto tradukas al latin-alfabeta lingvo tekston kun transkribitaj nomoj, ekz. el la 30-a n-ro, majo 1969, de la organo "Esperanto-gazeto" de Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto. Kiel restarigi la aŭtentikajn formojn de "Enco Bjaĝi, Fani Hil, Ledi Ĉersti, Ĝejn Rasel, Enĝi Dikinson, Erskin Koldvel, Meri Makarti, Kinsi, Klerk Ĝehl"? Eĉ en enciklopedioj oni ne scipovas ilin serĉi.

Kiom malutila kaj erariga estas transliterigado de propraj nomoj, montras tre klare "Poŝatlaso de la mondo" (Praha, 1971), kie inter la ĝustaj estonaj geografiaj nomoj Tartu, Narva, Rakvere, Tapa kaj Valga ni trovas la kripligitajn monstrojn Kjardlo, Kohtlajarvo, Pjarno, Ĥapsalo, Viljando, Sarema, Ĥiumo anstataŭ Kärdla, Kohtla-Järve, Pärnu, Haapsalu, Viljandi, Saaremaa, Hiiumaa. Saaremaa signifas "insullando", ankaŭ en Hiiumaa estas la sama komponento - lando/. Kiamaniere estiĝis tiaj barbaĵoj? Verŝajne tiel, ke la kompilintoj retransliterigis ilin el la rusa lingvo kaj la originajn finaĵojn mekanike kaj arbitre anstataŭigis per -o. Rezulte nek la "Poŝatlaso" nek la "Mondmapo" ni kurjaŝas montri en Estonio, ĉar ili kompromitas Esperanton kiel internacian lingvon. Interese, kiel plaĉas al la litovoj ilia Ŝiauliai en la "Esperanta" formo Ŝialajo?

Sekve ni vidas, ke en la afero de propraj nomoj en Esperanto lastatempe regas plena kaoso kaj anarkio (Buenos Aires-Buenos-Ajreso-Bonaero, Newton-Neltono-Njuton, Freud-Freŭdo-Frojdo ktp.). Kaj ni mem ĝin kreis! Ni mem sekas la branĉon, sur kiu ni sidas, ni konstruas inter la popoloj murojn, kiujn ni dekomence volis detruiri. Ni forgesis, ke Esperanto ne estas sekreta lingvo de iu fermita sekto, sed celas fariĝi interkomprenilo inter la popoloj.

Eĉ la malbonfama Volapük konservis la originajn formojn de personaj nomoj (Schleyer, Shakespeare, Byron, Goethe, Schopenhauer, Karl) kaj urbnomoj (Rom, München-München, Nürnberg, Mainz). Por savi la situacion estas necese restigi la ekscesan asimiladon kaj "esperantigadon" de propraj nomoj kaj reiri al la elasta kaj elprovita kutimo skribi personajn nomojn (krom la plej konataj malnovgrekaj kaj latinaj: Sokrato, Platono, Arkimedo, Prometeo, Odiseo, Cezaro, Cicerono, Horaco, Vergilio ktp.) ĝenerale senŝanĝe, en ilia origina for-

mo. Tiu maniero estas ankaŭ la plej internacia, ĉar krom la latva kaj litova procedas tiel ĉiuj latinalfabetaj lingvoj, inter ili ankaŭ parto de la slavaj. Kaj ilin scias kaj uzas ja granda plimulto de la homaro kaj almenaŭ iu el ili (la angla, franca, germana, itala, hispana-portugala) estas instruata en ĉiuj landoj de la mondo, inkluzive Sovet-Unio. Almenaŭ ilian prononcadon oni en la lernejoj pli-malpli alproprigas.

Sekve Shakespeare, Byron, Wilde, Rabelais, Jean-Jacques Rousseau (ne "Johano-Jakobo Russo"), Baudelaire, Goethe, Schiller, Heinrich Heine (ne Henriko Hajno", ĉar li neniam tiel nomiĝis!), Boccaccio, Dante, Charles Darwin, Karl Marx, Henrik Ibsen, Enrico Caruso, Henri Poincaré, Henry Ford, Hendrik Adamson, John Kennedy, Jean Forge, Eugen Wüster, Waringhien, Kalocsay, Baghy (ne "Varengjen, Kaloĉaj, Bagi", kiel skribis iu rusa s-ano), Vilho Setälä, Carl Støp-Bowitz ktp.ktp.

Ni ja havas en Esperanto multajn internacie konatajn antaŭ- aŭ baptonomojn (Andreo, Petro, Paŭlo, Johano, Karlo, Jakobo, Jozefo, Vilhelmo, Georgo, Henriko, Aŭgusto ktp., el kiuj ni siavice povas devenigi parte same internaciajn virinajn nomojn: Paŭlino, Jozefino, Vilhelmino), sed tio tute ne signifas, ke ni rebaptu per ili kaj esperantigu ĉiujn homojn, ankaŭ grandajn verkistojn kaj scienculojn, kiuj neniam estis esperantistoj. Ni mem kompreneble povas laŭplaĉe esperantigi niajn antaŭnomojn (klasikaj ekzemploj: Lazaro Ludoviko Zamenhof, Andreo Cseh, Kolomano Kalocsay, Julio Baghy) kaj eĉ familiajn nomojn (Grenkamp-Kornfeld), ni povas alpreni ankaŭ pseŭdonimojn, Esperantajn aŭ ne-Esperantajn (Jan Fethke - Jean Forge, Will Green - Vilĉjo Verda, William Auld - Vilhelmo Oldo), sed ni ne pretendu esperantigi ĉiujn antaŭnomojn, el kiuj multegaj eĉ ne estas esperantigeblaj (ekz. la svedaj Kalle, Pelle, Tage, Folke, Per, Rune, Sven, Gösta, Hakan, Ake, Göran, Bo, Dan, Olof ktp.). Ekzistas longa serio da belaj vere internaciaj virinaj nomoj kun la finaĵo -a (Ada, Anna, Bertta, Debora, Emma, Erna, Eva, Ida, Ira, Julia, Klara, Maria, Marta, Nora, Paŭla, Regina, Roza, Sofia, Tekla, Vera, Vilma, Viola ktp.), ni povas krei eĉ belajn pure Esperantajn nomojn Milda, Eta, Flora, Bela, Kara, Serena ktp., sed tio neniel rajtigas fabrikadon de tiaj nenaturaj formoj kiel Agnesa, Helma, Karmena (anstataŭ Agnes, Helmi, Carmen-Karmen), same Helva, Viva, Kojda, Lejla, Imba, Mala, Hia, Ena, Majma, Elca, Virva el la estonaj nomoj Helve, Viivi, Koidu, Leili, Imbi, Mall, Hiie, Ene, Maimu, Elts, Virve. Ni detenu nin

de absolutigado, kiu ofte rezultigas absurdecon, kaj pli multe atentu cel-
deformecon kaj oportunecon.

Nomoj havas ofte nacian karakteron kaj per ili oni povas distingi la nacie-
con de iliaj portantoj. Ekz. Wilhelm kaj Johannes estas germanoj, William kaj
John angloj, Guillaume kaj Jean francoj, Guglielmo kaj Giovanni italoj, Vilmos
kaj János hungaroj, Vilho kaj Juhani finnoj, Villem kaj Juhan estonoj, Ivan estas
ruso, Juan hispano, Jens dano, Jan polo. Ĉu ni agos ĝuste kaj ĉu oni aprobos
sin, se el ili ĉiuj ni faros Vilhelmojn kaj Johanojn, tio signifas germanojn? Ape-
nal.

Cetere, la popolnomoj /anglo, franco, germano/ ne estas propraj
nomoj, same kiel ekz. viro, kontoristo, sportisto, blondulo. Tial
ne estas logike skribi ilin per majusklo, kiel faras la angloj kaj francoj.

Ankaŭ ĉe geografiaj nomoj ni sekvu la praktikan internacian kutimon asimili
ar la plej konatajn, plej ofte uzatajn kaj jam tradiciajn: Eŭropo, Ameriko, At-
lantiko, Atlanta Oceano, Pacifiko, Hinda Oceano, Mediteraneo, Nigra Maro, Balta
Maro, Kaspia Maro, Oceanio, Antiloj, Kanariaj Insuloj, Nov-Zelando, Krimeo,
Skandinavio, Gotlando, Madagaskaro, Sicilio, Korsiko, Amazono, Danubo, Rej-
no, Volgo, Amuro, Jeniseo, Bajkalo, Kaŭkazo, Londono, Parizo, Berlino, Mos-
kvo, Romo, Vieno, Budapeŝto, Nov-Jorko, Tokio, Madrido, Hago, Ĝenevo, Ant-
verpeno, Amsterdamo, Bruselo, Varsovio, Kopenhago, Leningrado, Venecio, Bu-
langoj ktp. Ili povas esti rigardataj kiel pure Esperantaj vortoj kaj devus stari
en ĉiu Esperanta vortaro. Sed kiam geografiaj nomoj ne estas oportune asimil-
eblaj aŭ deformiĝas ĉe esperantigo, ni uzu ilin en ilia origina aŭ plej in-
ternacia formo. Sekve ne Talino, Helsinko, Oŭlo, Napolo, Riodoro, Siera-
leono, Sieranevado-Neĝa Montaro, Adisabebo, Kasablanko, Fritaŭno, Librevilo,
Ĝorĝtaŭno, Krisĉurĉo (la du lastaj estas veraj rebusoj, kiujn oni ne scipovas
serĉi eĉ en enciklopedioj) ktp. ktp., sed nepre Tallinn, Helsinki, Oulu, Napoli,
Rio de Oro, Sierra Leone, Sierra Nevada, Addis Abeba, Casablanca, Freetown,
Libreville, Georgetown, Christchurch. La unuaj, fuŝitaj formoj ekzistas en ne-
tiu lingvo, ankaŭ ne en la rusa transskripcio, kaj certe ne troviĝus ankaŭ en
Volapük, se ĝi ankoraŭ vivus. Ankaŭ Kajeno kaj Kajenurbo /Cayenne/, Franc-
jorrefaj Insuloj, Georgokvinalando, Princastrida Bordo, Afganujo, Beluĝujo, Ta-
ĝikujo k.a. similaj estas strangaj kaj pensigaj.

Prefere senŝanĝe, neesperantigite ni uzu ankaŭ sovetajn nelatinalfabetajn (rusajn, ukrainajn, blankrusajn, kartvelajn, armenajn k.a.) geografiajn nomojn, precipe kiam ili finiĝas per vokalo: Luga, Poltava, Vologda, Kostroma, Gorki, Peĉora, Alma-Ata, Soĉi, Kemerovo, Orĝonikidze, Kandalakŝa, Ivanovo, Krasnogvardejskoje, Divnoje, Danilovka, Baranoviĉi ktp. En "Poŝatlaso de la mondo" regas en tiu rilato plena kaoso: Minsk, Kiev, Smolensk, Vitebsk, Novgorod, Petrozavodsk, Murmansk, Tomsk, Sverdlovsk, Vologda, Poltava, Kostroma, Volgograd, eĉ Leningrad, sed Arĥangelsko, Pskovo, Voroneĵo, Voroŝilovgrado, Lugo, Bako, Soĉo, Gorkio, Peĉoro, Baranoviĉo, Bransko (anstataŭ Brjansk), Divnojo, Krasnogvardejskojo, Orĝonikidzo, Proletarskajo (anstataŭ Proletarskaja), Krivojrogo (anstataŭ Krivoj Rog) ktp. "Malnovrusa" (Staraja Russa) kaj "Granda Luko" (Velikije Luki) estas malfacile divenoblaj eĉ por rusoj. Ĉe Leningrado estas la urbo Puŝkin (iama Carskoje Selo), ĉe Moskvo Puŝkino (kun akcento sur la unua silabo), sed en la atlaso ambaŭ estas Puŝkino. Entute neeble kompreni, kiu kriterio gvidis la kompilintojn.^{&/}

Cetere, anstataŭ Orĝonikidze estus eble pli celkonforme skribi Ordĝonikidze, ĉar tio pli respondus al la origina formo. Kial do ni ne povu en okazo de bezono uzi la literkombinaĵon dĝ, malgraŭ tio, ke ni havas ĝ? Same eble Dĝakarto kaj Kambodĝo?

Kiel ni vidas, la bildo de la propraj nomoj, kaj personaj kaj geografiaj, estas tre bunta. Kaj bunta ĝi estas pro la komplikita kaj tre varia ortografio de la naciaj lingvoj. Ne ni, adeptoj de internacia lingvo, estas kulpaj en tio, kaj ne nia tasko estas reformi kaj unuecigi la ortografion de propraj nomoj, kiuj ne apartenas al Esperanto kaj estas por ĝi vortoj fremdaj. Ni ne okupiĝu pri aferoj al ni fremdaj; ĉar jam sen tio ni havas sufiĉe da malfacilaĵoj, sed ni fosu nian sulkon, t.e. laboru por la disvastigado kaj sukcesigo de Esperanto.

Por faciligi al la esperantistoj la legadon kaj prononcadon de fremdaj nomoj, en multaj okazoj tamen tre proksimuman, estus tre rekomendinde kompili kaj eldoni manlibreton, kie estas mallonge klarigita elparolo de propraj nomoj en ĉiuj latinalfabetaj lingvoj.

^{&/} La kriterioj estis defendataj en *Sc.Revuo* 23, n-ro 1/2 (Rim. de redaktoro).